Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 6 Aŭgusto 2020



ĈI NUMERE:

- Dividu kaj regu ! La deveno de la flagoj de Irlando, Barato kaj Kipro.
- Flagoj de Islando.
- Flagoj kun ses koloroj.
- La flagoj de la maro.
- La Esperanto-flago en la funebraj ceremonioj.
- La blazono de Ekvadoro

# VENTO

## Veksilologia revuo en Esperanto

Eldonita de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Adresoj: 💻 cordoba@esperanto.ac

✉ Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editado en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
*Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.*

**ENHAVO** Paĝo

| | |
|---|---|
| Dividu kaj regu! La sama deveno de la flagoj de Irlando, Barato kaj Kipro | 3 |
| Flagoj de Islando | 14 |
| Flagoj kun ses koloroj | 19 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 21 |
| La Fotografaĵo de niaj Legantoj | 24 |
| La flagoj de la maro | 25 |
| Uzo de la Esperanto-flago dum funebraj ceremonioj | 31 |
| La Angulo de la Blazonoj: *Ekvadoro* | 33 |
| Mallongaj Informoj pri la Asocio V.E.N.T.O. | 36 |
| Veksilologia terminaro | 37 |
| Kiel kunlabori kun VENTO | 38 |
| Veksilologia humuro | 39 |

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentantaj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# *Dividu kaj regu !*

## *La sama deveno de la flagoj de Irlando, Barato kaj Kipro*

José M. Rodríguez (Hispanio)

Laŭdire unu el la unuaj politikistoj kiuj sekvis la sentencon *"Dividu kaj regu !"* estis Julio Cezaro. Pere de ĉi tiu politika strategio, reganto dividas kaj disigas teritoriojn laŭ malsimilaj grupoj tie jam ekzistantaj kaj samtempe, li provokas malakordojn kaj disputojn inter ili, kun la celo malebligi komunan agadon de la tuta enloĝantaro kontraŭ tiu reganto. Kiel dirite, ĉi tiun sentencon efektivigis inter aliaj Julio Cezaro, tiel la romia imperio sukcese kontrolis popolojn kaj teritoriojn.

Tamen, ĉi tiu politika agad-sistemo ne nur estis plenumita de antikvaj imperioj, ankaŭ okaze de la koloniismo de la 19-a kaj 20-a jarcentoj aliaj imperioj, kiel tiu brita, sekvis laŭvorte tiun sentencon, ekzemple en la hinda subkontinento. Konkrete, britoj starigis limojn inter malsimilaj regitaj popoloj kaj sociaj grupoj, li samtempe favorigis disputojn inter ili, ĉefe el la lingva, religia kaj kultura vidpunkto. Ĉi tiuj disputoj daŭriĝis post la sendependiĝo de la teritorioj kaj ili ofte estis kaŭzoj de militoj en la naskiĝantaj ŝtatoj.

Ĉi tiu sentenco *"Dividu kaj regu !"* videblas ankaŭ sur la flagoj de kelkaj landoj antaŭe koloniitaj, jes ja. Ni vidu hodiaŭ tri okulfrapajn ekzemplojn en aliaj tri flagoj, pri kiuj ni eble eĉ povus aserti, ke ili havas saman originon. Temas pri la standardoj de Irlando, Barato (ankaŭ konata kiel Hinda Unio) kaj Kipro.

# La Irlanda flago.

La nuntempa irlanda flago aperis en la jaro 1848. Ĝi estis donaco al Thomas Francis Meagher (1823-1867) de francaj virinoj kiuj simpatiis al la ideo pri libera Irlando. La franca origino de la irlanda flago klarigas la ekziston de tri vertikalaj strioj sur la standardo. Meagher, irlanda patrioto, uzis ĝin okaze de la ribelo de la *Juna Irlando*, kiu okazis en 1848. Li sciigis pri la jena signifo de la koloroj de la flago:

*"La blanka koloro en la centra parto de la flago signifas daŭran pacon inter la verda kaj la oranĝa koloroj."* La verda strio reprezentas la katolikajn irlandanojn kaj tiu oranĝa la protestantajn irlandanojn, kiu laŭ deziro de la irlanda patrioto, ĉiuj ili povus flirtigi la standardon per heroa kaj sindonema frateco.



Irlanda flago, flirtigita unuafoje la 7-an de marto 1848.
Oficiala standardo de Irlando post 1922

La verda koloro jam estis uzata en la jaro 1642, tiam irlanda soldato Owen Roe O'Neill (1585 – 1649) kreis unu el la unuaj irlandaj flagoj. Temis pri verda standardo sur kiu li aldonis la tradician irlandan blazonon reprezentanta harpon, tamen ĉi tiu flago neniam estis oficiala, kvankam ja uzata okaze de la ribelo de la *Society of United Irishmen* en la jaro 1798, kiu celis la fondiĝon de respubliko en la irlanda insulo.




Flago de Owen Roe O'Neill, flirtigita de la irlandaj patriotoj en la ribelo de la jaro 1798

Alia pruvo de la graveco de la verda koloro por la irlandaj naciistoj, estas la flago flirtigita dum la *Paska Ribelo* de la jaro 1916. Jen ĝi:




Kaj kio pri la alia irlanda komunumo reprezentata de la oranĝa koloro? Nu, la oranĝa vertikala dekstra strio de la irlanda flago reprezentas la protestantan popolon de Irlando, ĉefe loĝanta en la nordo de la insulo, parolanta plejmulte la anglan lingvon kaj historie favora al la integriĝo de la insulo en la Brita Imperio. La oranĝa estas

la koloro de la reĝo Vilhelmo de Orange, brita reĝo, naskiĝinta en Nederlando -do, jen la origino de la oranĝa koloro- kiu luktis kontraŭ la katolikoj kaj favorigis la unuigon de Irlando al la brita regnolando.



Flago de la Oranĝ-ordeno, fondita en la jaro 1795 por defendi la civilajn kaj religiajn privilegiojn, kiujn la reĝo Vilhelmo la 3-a koncesiis al la irlandaj protestantoj post batalo ĉe Bojno (Irlando) kontraŭ la katolika angla reĝo Jakobo la 2-a.

Do, koloniismo favorigis la ekziston de du komunumoj en la irlanda insulo, kun malsimilaj religioj, lingvoj kaj privilegioj, reprezentataj de la koloroj verda kaj oranĝa. Temis pri du komunumoj kiuj luktis inter si dum jarcentoj. La naskiĝo de Irlando kiel respubliko en la jaro 1921 sopiris la definitivan pacon inter ambaŭ komunumoj, do, blanka strio troviĝas sur la centra parto de la flago kun la deziro meti daŭran pacon sur ambaŭ popoloj. Ĉu tiuj pac-deziroj realiĝis? Nu, ni ĉiuj konas la terurajn okazintaĵojn kiujn travivis Irlando ĝis la, esperebble, definitiva paco subskribita okaze de la akordo de la Paska Vendredo de la jaro 1998.

## La Barata flago.

La nomo Barato havas la saman signifon kiel *Hinda Unio* kaj ĝi estas preferata por la tiea esperantistaro por nomi tiun grandegan landon, kiu apartenis al la Brita Imperio ĝis la jaro 1947. Post la 15-a jarcento la hinda subkontinento estis la celo de kelkaj eŭropaj imperioj, ĉefe la portugala, la franca, la nederlanda kaj la brita, eĉ Danio establis tie komercajn setlejojn. Post akordo subskribita kun Francio, Britio trovis liberan vojon en tiu subkontinento, tiel, meze de la 19-a jarcento la tuta teritorio jam apartenis al la brita imperio. La kolonianta povo favorigis la malakordojn inter hindaj princoj por malfaciligi ilian komunan agadon kontraŭ la metropolo. Same, okaze de la lukto por la sendependiĝo de la teritorio aperis organizoj kiuj luktis favore al tio, tamen bazitaj sur la socia kaj religia deveno de la enloĝantoj, tio estas hindoj aŭ islamanoj. Kvankam multaj aktivistoj sopiris la sendependiĝon de unusola nova ŝtato, fine fondiĝis Barato, kie la hindoj estas la plejmulto, kaj Pakistano, la ŝtato por la islamanoj en la hinda subkontinento. Do, la unuiĝo de ambaŭ komunumoj troviĝantaj ĉe la hinda subkontinento (hindoj kaj islamanoj) aperis sur la unuaj standardoj de la liberiga barata movado.

En la jaro 1905 la Vicreĝo de Hindio, Lord Curzon, anoncis la dispartigon de Bengalio, ĉe la orienta parto de la kolonio, kiu celis separi la islamajn orientajn areojn el hinduismaj okcidentaj areoj. Hinduoj koleriĝis pro tio, temis pri evidenta ekzemplo de la politiko "Dividu kaj regu". Konsekvence hinduoj kaj islamanoj formis siajn proprajn naciajn organizojn, tamen ekzistis ankaŭ komuna senco daŭrigi politikan projekton pri unuigita Barato. Pruvo pri ti sopiro estis la kreo de la tiel nomata "Flago de Kalkato", kiu proteste al tiu projektita divido de la kolonio, sur la flago aperis kune la suno kaj la kreskanta luno, simboloj de la hinduoj kaj la islamanoj.










Maldekstren la unua versio de la tiel nomata "Flago de Kolkato". Supre aperas tiom da steloj kiel provincoj de la Hinda Imperio; meze la devizo "Ho, Patrino, mi salutas Vin!". Sube, la religiaj simboloj de la ĉefaj komunumoj de Barato; la suno kaj la kreskanta luno, ambaŭ unuigitaj sur la sama pozicio. Dekstren, la dua versio de la flago, kiu nuntempe estas la flago de la urbo Kolkato, la steloj estas anstataŭigitaj de lotusaj floroj.

Dezirojn unuigi pace ĉiujn komunumojn ene de sama teritorio sopiris eĉ tiuj kiuj ne luktis favore al la sendependiĝo de la kolonio, tiel la "Ligo por la Mem-registaro de la tuta Hindio", kiu nur celis atingi aŭtonomion ene de la Brita Imperio por Hindio, prezentis en la jaro 1917 flagon kie aperis kune islamaj kaj hinduaj elementoj, tiel kreskanta luno kaj la konstelacio de Granda Ursino, konata en Hindio kiel "La Sep Saĝuloj".




En la jaro 1916 du barataj patriotoj, Umbar Sobani kaj SB Bomanji kreis la Komitaton por la Nacia Barata Flago. Ili dezajnis kelkajn projektojn, kelkaj el ili ne akceptitaj de Mahatma Gandhi, la animo de la deziroj pri sendependiĝo de Barato, pro la fakto, ke la koloroj ne reprezentis ĉiujn religiojn, do ĉiujn komunumojn de Barato. Denove, oni komprenas, ke la sopirata nacia flago de sendependiĝa Barato devus elstarigi kaj proklami la konkordon ene de kiu devus vivi ĉiuj barataj komunumoj.





Kelkaj flagoj proponitaj al la Komitato por la Nacia Barata Flago jam inkluzivis la ŝpin-maŝinon proponitan de Gandhi kiel nacia simbolo. Maldekstren la koloroj reprezentas la ĉefajn religiojn de Barato, dekstren la ŝafran-koloro nur omaĝas la hindan popolon, ĝi estas bazita sur la soveta flago.

Post kelkaj proponoj la Barata Kongreso aprobis en la jaro 1931 la trikoloran nacian flagon, kun tri strioj: ŝafran-kolora, blanka kaj verda. Meze de la flago, sur la blanka strio aperis unuamomente ŝpin-maŝino, laŭ propono de Gandhi.



La aŭtoro de la projekto estis Pingali Venkayya (1876 – 1963). Kelkajn klarigojn oni diskonigis por kompreni la signifon de la koloroj, inter ili, ke la ŝafran-koloro reprezentas la kuraĝon, la blanka koloro la pacon kaj tiu verda la fidon. Tamen, reale, la supra strio ŝafran-koloro reprezentas la hindan komunumon, la verda strio la islaman popolon, ambaŭ kiel ĉefaj komunumoj de la sopirata Barata Unio, kaj meze la blanka koloro montras la dezirojn pri paco inter ambaŭ popoloj. Meze la ŝpin-maŝino proponita de Mahatma Gandhi reprezentas la laboremon de la nova lando.

Denove, oni povas vidi, ke la nacia flago proponita elstarigas la konkordon kaj la pac-dezirojn inter du popoloj dividitaj pro la koloniismo. Fine, en la jaro 1947, okaze de la sendependiĝo de Barato, la adoptita flago estis tute simila al tiu aprobita en la jaro 1931, kvankam oni anstataŭis la ŝpin-maŝinon per 24-a pinta marblua rado, prenita de kolona kapitelo de la imperiestro Aŝoko.



## La Kipra flago.

Kipro estas mediteranea insulo tre proksima al Turkio. Post la milito inter Rusio kaj Turkio en la jaro 1878 britoj okupis la insulon kaj deklaris la teritorion kiel britan protektoraton. Verdire la insulo estis strategie grava por defendi la Suezan Kanalon, konstruita meze de la 19-a jarcento.

En la jaro 1914, kiam Turkio decidis lukti favore al Germanio dum la unua mond-milito, do malamike al Britio, la insulo Kipro estis aneksata oficiale al la Brita Imperio. Tiu statuso trovis konfirmon okaze de internaciaj akordoj aprobitaj en la jaroj 1920 kaj 1923, post la granda milito. En la insulo 75 % el la enloĝantaro estis grek-devena kiuj sopiris unuiĝi al Grekio, la cetera 25 % estis turk-devena, kiuj preferis dividi la insulon kaj eviti ĉi tiel esti minoritato en onta Kipro unuigita al Grekio aŭ eĉ en sendependa lando, se finfine la insulo atingus sendependiĝon.

En la jaro 1958 la brita premiero Harold Wilson proponis dividi la insulon laŭ tiuj du komunumoj: greka kaj turka, tamen la ĉefa reprezentanto de la greka enloĝantaro de Kipro, la ĉefepiskopo Makarios la 3-a rezignis peti la unuiĝon al Grekio, kondiĉe ke la onta sendependiĝo estu de la tuta insulo kaj ne de du ŝtatoj ĉe dividita teritorio. Rilate la flagon, ĝi estis selektita de la Prezidanto ĉefepiskopo Makarios en la jaro 1960 laŭ propono de turk-devena instruisto. La flago de la nova ŝtato reprezentas pacajn dezirojn inter du malsimilaj, kaj ofte, militemaj komunumoj. Ene de ĝi aperas flava mapo de la insulo mem super du verdaj oliv-branĉoj, reprezentantaj la dezirojn de la du komunumoj loĝi pace en komuna insulo. La flago evitas la aperon de religiaj simboloj de la komunumoj (kreskanta luno aŭ kruco) kaj same oni ne uzis la bluan aŭ la ruĝan kolorojn, simboloj de la greka kaj de la turka komunumoj respektive.

Ĉu tiuj pac-deziroj realiĝis post la sendependiĝo? Bedaŭrinde ne. La konstitucio de la nova ŝtato agnoskis rajtojn al ambaŭ komunumoj, ekzemple la prezidantecon devus okupi grek-devena kipro, tamen la vicprezidanto ĉiam devus esti turk-devena. En la jaro 1963 la Prezidento Makarios decidis nuligi ĉi tiujn kaj aliajn rajtojn de la turkoj en Kipro kaj tio favorigis la disputojn inter ambaŭ komunumoj, kun la danĝero favorigi la militan intervenon de Grekio kaj/aŭ Turkio. Fine en la jaro 1964 UN-blukaskuloj alvenis en la insulon por garantii la pacon inter turkoj kaj grekoj en Kipro.

*Okaze de la dezajno de la sekvantaj flagoj oni uzas nigran konturon por faciligi la vidon de la flagojn, tamen tiuj nigraj eksteraj linioj tute ne aperas sur la flagoj.*



Proponita flago por Kipro en la jaro 1960



Flago de Kipro inter la jaroj 1960 kaj 2006



Flago de Kipro post la jaro 2006

Malgraŭ la deziroj flirtigitaj de la flago, la paco ne alvenis por ambaŭ komunumoj. Tiel, en la jaro 1974 la greka registaro favorigis puĉon en Kipro kiu deponis la legitiman registaron kaj proklamis la "Grekan Respublikon de Kipro". Reage, Turkio invadis kaj okupis milite la nordan trionon de la insulo kaj tie oni proklamis la Turkan Respublikon de Norda Kipro, ŝtato fakte agnoskata nur de Turkio kaj de la Organizaĵo de la Islama Konferenco. Malgraŭ la deziroj esprimitaj de la unua kipra flago, nuntempe Kipro estas dividita insulo.



Flago de la mem-proklamita Turka Respubliko de Norda Kipro. La koloro ruĝa kaj la religia simbolo sendube montras, ke ĝi reprezentas nur unu el la komunumoj de la insulo.

Ni deziras krei kaj oficialigi la veksilologian movadon en Esperantio. Ĉu vi deziras kunlabori kaj ĉefroli en ĉi tiu projekto ? Se jes, legu atente nian agad-planon (paĝo 36-a) Ni kalkulas je Vi !



# Flagoj de Islando

Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)

En la nordo de Eŭropo troviĝas la insulo Islando, kie nia granda verkisto Baldur Ragnarsson naskiĝis. Tamen ni ne parolu pri literaturo, sed pri flagoj!

**PASINTECE**


La flago de Islando ne ĉiam estis la sama. Tiel, dum la tiel nomata Islanda Komunumo (*Þjóðveldið Ísland*), la flago estis jena (fakte, la unua flago de Islando; ĉ. 930 – 1262):




Poste, estis unuiĝoj inter Islando kaj aliaj nordaj regnoj (Norvegio, ekz.). Unu el la plej gravaj okazaĵoj en la historio de la lando estis la unuiĝo de Islando kaj Danio. Antaŭ la 1-a de decembro de la jaro 1918, Islando ne havis praktike suverenecon. La 1-an de decembro de 1918, Islando iĝis la Regno de Islando, kiu ankoraŭ estis parto de de la Regno de Danio. La reĝo de Islando, kompreneble, estis la reĝo de Danio. La tiamaj flagoj estis jenaj (bonvolu esti atenta pri la koloroj!):



Civila flago



Ŝtata kaj milita flago



Flago de la regento de Islando




Standardo de la Reĝo de Islando

**NUNTEMPE**

La nuna Islando havas kelkajn flagojn. Mi ne diris, ke oni observu bonege la kolorojn de la flago vane. Vidu la nunajn flagojn de Islando (kaj la diferencojn kun la antaŭaj):




Civila flago



Ŝtata kaj milita flago


La ŝtata kaj milita flago estas uzataj de la Islanda Sistemo de Aer-defendo (*Íslenska Loftvarnarkerfið*), la Islanda Marborda Patrolo (*Landhelgisgæsla Íslands*) kaj de la Islanda Trupo de respondo en krizaj situacioj (*Íslenska Friðargæslan*). Aldone, tian flago oni povas trovi ĉe ambasadejoj.

En kelkaj landoj, la prezidanto havas ankaŭ propran flagon. En Islando, la prezidanto havas flagon kun la ŝildo de la lando:



Flago de la prezidanto de Islando

Oh! Kiom da flagoj! Sed tio, ne estas ĉio! Eĉ la islanda dogano havas flagon: ĝi estas esence la ŝtata flago kun T (*Tollstjóri*, en la islanda):



En la leĝo pri la flago de Islando, oni dekretas, ke la flago flirtu en ĉiuj oficialaj konstruaĵoj en jenaj tagoj: la naskiĝtago de la prezidanto de Islando, la Novjara Tago, Granda Vendredo, Pasko, la


unua tago de la somero, la 1-a de majo, Pentekosto, la Tago de la maristoj, la Islando-Tago, la Tago de la islanda lingvo, la 1-a de decembro kaj en Kristnasko. Pli da detaloj kaj nuancoj troviĝas en la paĝo (angle): https://www.government.is/topics/governance-and-national-symbols/icelandic-national-flag/

**ALIAJ FLAGOJ**

Tra la lando diversaj flagoj flirtis, malgraŭ tio, ke ili ne estis oficialaj:



Flago uzita de la sendependenca movado de Islando dum la 19-a jarcento



Flago proponita en la Flaga Komitato (1913)



Flago uzita de la respublikisma movado; kurioza en la Flaga Komitato (1913), oni ĝin malakceptis pro ĝia simileco al la flago de Svedio.



**Ĉu gravas kie vi loĝas? Tute ne!**

**Bv. uzi maskon kiam vi renkontos kun ne-oftaj apuduloj kaj ne alproksimiĝu malpli ol 1,5 metroj. Ni evitu koronvirusajn infektiĝojn**


# Flagoj kun ses koloroj

Cristina Bollini (Italio)

Hodiaŭ estas pli ol 260 ŝtatoj kiuj havas propran flagon. Multaj flagoj ne havas emblemojn kaj entenas du aŭ tri kolorojn. Estas aliaj flagoj kun komplikaj blazonoj (ekz. Moldavio, Meksiko, ktp.) sed estas nur du flagoj kiuj havas ses kolorojn kaj neniun blazonon. Ambaŭ landoj troviĝas en Afriko, Sud-Afriko kaj Sud-Sudano. Jen la du flagoj:



Sudafrika flago



Sud-sudana flago

La samaj koloroj estas nigro, ruĝo, verdo, flavo kaj blanko. En la flago de Sud-Afriko estas la bluo, sed en la flago de Sud-Sudano estas lazuro (pli milda nuanco de bluo). Ĉu samaj koloroj kaj samaj signifoj? Ne.

En la flago de Sud-Afriko, desegnita de Frederick Brownell, la koloroj reprezentas ĉiujn etnojn kaj ĉiujn politikajn partiojn de la lando. Nigro, flavo kaj verdo estis la koloroj de la "African National Congress" (partio de Nelson Mandela). Blanko, bluo kaj verdo reprezentas la afrikanerojn (kiuj havas nederlandajn originojn; fakte la boera flago havis la samajn kolorojn). La partio de la libereco Inkatha

de la Zuluoj estas memorigata per la koloroj nigro, verdo, flavo, ruĝo kaj blanko. La popoloj de Trasnvaal retrovis blankon, bluon kaj ruĝon. La formo de Y rilatas al la ideo de unueco kaj harmonio post jaroj da bataloj.

En la flago de Sud-Sudano la koloroj estas tiuj de la Sudana armeo de Popola Liberigo, partio kiu gvidis la landon ĝis la sendependeco. Bluo kaj flavo reprezentas la akvon de la rivero Nilo kaj la esperon en la progreso, kiun portos la estonto al la lando finfine unuigita kaj pacigita. La nigro estas la popolo de Sud-Sudano, la blanko la paco, la ruĝo reprezentas la sangon elverŝitan por akiri ĝin. Verdo simbolas la grundon kaj la vegetadon de la lando.




De nia kunlaborantino CRISTINA BOLLINI ĵus aperis
***"LE BANDIERE. TUTTI I COLORI DEL MONDO",***
(La flagoj. La tutaj koloroj de la mondo) 15 €. Vizitu:

https://www.mondadoristore.it/bandiere-Tutti-colori-mondo-Cristina-Bollini/eai978882786438/

# Lastaj informoj pri Flagoj

## Ĉu nova flago por Misisipio ?

La ĉambro de deputitoj de la usona ŝtato Misisipo aprobis, fine de la monato junio, kun 85 voĉoj poraj kaj 34 kontraŭaj, rezolucion kiu celas ekigi la proceduron por modifi la flagon de la ŝtato. La nuntempa flago estis dezajnata en la jaro 1894 kaj ene de ĝi aperas la flagon de la Konfederaciitaj ŝtatoj de Ameriko, nacio kiu kreiĝis el la sudaj ŝtatoj de Usono kiuj secesiis el la Unio kaj ekzistis ĝis sia malvenko en la Usona Enlanda Milito (1861–1865). Dum la ekizsto de la Konfederaciitaj ŝtatoj de Ameriko la sklaveco estis laŭleĝa, certe ene de tiu efemera lando loĝis pli ol 3 milionoj da sklavoj. La iniciato por modifi la flagon de la ŝtato rapidiĝis konsekvence de la kontraŭrasismaj surstrataj protestoj kiuj aperis post la murdo de George Floyd la pasintan 25an de majo okaze de polica aresto.



Nuntempa flago de Misisipio.



*Ĉu la venonta?*

# Ne estos eble flirtigi ne-oficialajn flagojn en administraciaj konstruaĵoj en Hispanio, laŭ ĵusa juĝo.

La Hispana Supera Kortumo ĵus juĝis, ke la publikaj administracioj devas esti tute neŭtralaj rilate la uzon de flagoj, tio estas, ĉe la administraciejo devas flirti tiuj flagoj de la teritorio, ekzemple eŭropa, hispana, komunuma, municipa..., sed tute ne tiuj flagoj kiuj ne estas oficialaj, eĉ se tiu flirtado estas efemera. Tiu juĝo nuligas la decidon de la Urbodomo de Sankta Kruco de Tenerife, en la kanaria insularo kiu aprobis la flirtigon de la sendependa movado de la insularo. Laŭ la municipaj aŭtoritatuloj temis pri simbolo de la kanaria popolo, tamen la supera kortumo juĝis, ke ne temas pri oficiala flago, do ĝi ne reprezentas la popolon. En Hispanio estas tre ofte flirtigi flagojn en urbodomoj aŭ en administraciaj konstruaĵoj por memori specialajn okazintaĵojn aŭ eĉ por festi sportajn triumfojn, tamen jam tio ne estos ebla laŭ la ĵusa sentenco de la Supera Kortumo.



GLAT-a flago ĉe la urbodomo de la urbo Kadizo (sude de Hispanio) apud la flagoj de Hispanio, Andaluzio kaj la urbo Kadizo mem. Laŭ la ĵusa juĝo de la Hispana Supera Kortumo jam ne estos eble flirtigi ne-oficialajn flagojn ĉe oficialaj konstruaĵoj.

# Sud-Koreio protestas kontraŭ la ebla uzo de la japana flago kun sun-radioj dum la olimpiaj ludoj.

La sud-korea registaro petis al la olimpika internacia komitato malpermesi la uzon de la japana flago de la “Naskiĝanta suno”, sub la aserto, ke ĉi tiu flago memorigas la teruraĵojn faritaj de la japanaj koloniistoj antaŭ kaj dum la dua mond-milito. Tiu flago egalas al la japana standardo, tamen el la ruĝa cirklo eliras 16 ruĝaj radioj. Ĉi tiu flago estas uzata de la naciisma japana movado kaj laŭ la sud-korea registaro ĝi povas esti komparita al la flago de la nazia germanio kun la svastika kruco. Laŭ la sud-koreaj aŭtoritatuloj, se la svastiko memorigas al eŭropanoj la teruraĵojn de la nazia reĝimo, same tiu japana flago kun la 16 ruĝaj radioj ankaŭ provokas historian doloron al sud-koreanoj. La afero estas ke la uzado de tiu flago ne estas malpermesita en Japano do ili povas esti uzataj de la publiko en la olimpika stadiono. Laŭ aserto de la organizantoj de la Tokia olimpikaj ludoj la uzo de tiu flago ne havas en Japanio politikan signifon, kaj ĝi estas tute permesita.



# La fotografaĵo de niaj legantoj

Ĉi-numere la fotografaĵo reale ne temas pri flago, tamen ĝi estas ege interesa, ĉar la perspektivo kaj la hazardo unuiĝas por vidigi nian Esperanto-flagon tie kie, reale, eĉ troviĝas neniu flago, nur finjara sur-strata ornamaĵo super verda ŝtofo. Fotis nia franca samideano Frederic Neyret komence de la jaro 2019 en la ĉefa strato de la kvartalo Triana en la urbo Las Palmas, kanaria insularo (Hispanio).



# La flagoj de la maro

Cristina Bollini (Italio)

Homo ĉiam trakuras la maron. Ankaŭ en la maro estas grava afero komuniki, interŝanĝi mesaĝojn. Sed, kiel establi komunikojn kiam ofte la ŝipanaroj venas de multaj nacioj kaj ili parolas diversajn lingvojn?


Krom Esperanto, estas alia internacia lingvo: la lingvo de la flagoj. Ĉi tiu lingvo nomiĝas "Internacia Kodo de la Maraj Signaloj" kaj konsistas el 40 elementoj, do el 40 malsamaj signalflagoj. 26 estas la literoj, 10 estas numeroj, 3 estas "ripetiloj", kaj unu estas speciala flago nomata "inteligento".

Literoj kaj numeroj ankaŭ havas fonetikan utiligon en la angla lingvo.La "ripetiloj" estas uzataj por ripeti la lastan literon aŭ la lastan komunikon. La flago "inteligento" devas esti duonhisita kiam oni ricevas mesaĝon, antaŭe hisi la respondon. Kiam la ŝipo komencas aŭ finas konversacion, devas hisi la flagon "inteligento". Kiam la flago "inteligento" estas lokata inter la numeroj, ĝi signifas punkton (.) aŭ komon (,).

La flagoj povas esti hisataj en grupoj (ĝis 4 elementoj) kaj devas esti legataj de supre al sube. Kiam oni hisas plurajn grupojn, ili devas esti preterdistancitaj je almenaŭ 2 metrojn. Kutime la signaladoj limigas sin je unu aŭ du literoj, sed ankaŭ eblas sendi kompletajn frazojn.

Jen la signifoj de la kvardek signaloj

Numeroj




Inteligento kaj ripetiloj




Literoj



**Unuopa flago (litero)**
A: skfandistro (aŭ subakva naĝisto) mergiĝinta. Antaŭeniru malrapide kaj malproksime
B: danĝera ŝarĝo
C: jen (aserta)
D: restu distance
E: mi albordiĝas triborde
F: la ŝipo averias, bonvulo komuniku kun me
G: mi bezonas piloton. (Sur la fiŝkapta-boato: mi levas reton)
H: mi havas piloton ŝipe
I: la ŝipo antaŭeneras maldekstre
J: brulo ŝipe aŭ danĝera likado
K: la ŝipo bezonas komuniki
L: ĉe la marbordo: haltu tujtuje vian ŝippn – ĉe la marhaveno: ŝipo en kvaranteno
M: la ŝipo estas senmova
N: ne (negativa)
O: homo enmare
P: ĉe la marbordo: albordiĝu tuj, la ŝipo estas ekveturonta; dum la navigado: lumigiloj estingitaj aŭ miskfunkciantaj. (Sur la fiŝkapta-boato: la ŝipo havas grundigitajn retojn)
Q: la ŝipo havas la sanitarajn kondicojn kaj petas rajtigo antaŭenriri
R: ĉe la marbordo sur militaj ŝipoj: la ŝipo antaŭeniras sur ŝia raŭto, vi povas preterpasi min
S: la ŝipo retroiras
T: restu malproksime. La ŝipo fiŝkaptas kun alia barko
U: vi iras renkonte al danĝero
V: la ŝipo postulas helpon
W: la ŝipo postulas kuracistan helpon
X: haltigu operaciojn
Y: la ŝipo havas erpantan ankron aŭ la ŝipo transportas poŝton
Z: la ŝipo bezonas trenŝipon. (Sur la fiŝkapta-boato: la ŝipo enakvigas la retojn)

**Paro da flagoj**
AC – Mi elŝipiĝas
AN – Mi bezonas kuraciston
BR – Mi bezonas helikopteron
CD – Mi petas tujan helpon
DV – Mi drivas
EF – SOS aŭ MAYDAY nuligitaj
FA – Bonvulo, donu al mi mian pozicion
GW – Homo enmare!
JL – Vi riskas sursabliĝi
LO – Mia posizio estas malĝusta (kiam hisata sur lumŝipo)
NC – Mi estas en danĝero, petas helpon
PD – Viaj navigadlumoj ne estas videblaj
PP – Restu distance
QD – Mi daŭrigas rekte
QQ – Mi petas sanitaran rajtigon aŭ mi petas liberspacon antaŭ mi
QT – Mi albordiĝas maldekstre
QU – Firmiĝo malpermesita
QX – Mi petas permeson firmiĝi min
RU – Restu distance, mi malfacile manovras
SO – Haltu tujtuje
UM – Haveno fermita
UP – Mi petas urĝe permeson eniri al haveno, mi havas urĝan beznon sur la ŝipon
YU – Mi komunikos per "Signala Internacia Kodo"
ZL – Mi ne komprenas vian signalon

Krom la signalaj flagoj, en ĉiuj barkoj ĉiam ĉeestus
**Nacia flago**
La nacia flago estas la flago de la propra lando; ĝi devas esti la plej granda kaj hisata ĉiumatene, por indiki ke ekzistas agado ene de la

ŝipo, okaze de la subsuniro la flago estas malaltigita, eĉ se sur la ŝipo ankoraŭ oni agadas.

**Afabla flago**
Ĉi tiu flago identigas la akvojn en kiuj la boato nun navigas, se ili ne estas la teritoriaj de propra lando. Ĝi ne estas deviga.

**Flago de rigisto**
Ĝi estas la flago de rigisto (aŭ posedanto) de la boato; ĝi povas esti libere elektita kaj desegnita, sed ne devas esti simila al aliaj komune uzataj flagoj. La flago povas esti uzata nur kiam la ŝipestro (rigisto) estas surŝipe.  Tamen, se surŝipe estas kapitanoj kun pli granda rango aŭ iun ajn aŭtoritato, devas esti levita la flago de la plej altranga persono.

**Socia signalflageto**
Identigas la velklubon al kiu ĝi apartenas kaj povas resti hisata eĉ vespere.

Okaze de la festotagoj oni povas "festornami ŝipon per flagoj" utiligante ĉiuj flagoj de la Internacia Signala Kodo (tiu nomiĝas "Granda Pavezo"). La flagoj devas esti hisataj de pruo ĝis poŭpo, pasante tra ĉiuj mastoj, kune kun la nacia flago. Ĉiuj flagoj devas esti malaltigitaj post la nacia flago.Se la boato ne havas la kompletan aron da flagoj, devas hisi la "Malgrandan Pavezon", kiu estas la sola nacia flago hisita, ĉi-kaze, sur la ĉefmasto.


D
F
U
A
O
M
R
p2
J
p0
N
p9
K
p7
V
p5
L
C
S
H
X
B
Y
T
I
p1
P
p6
W
p4
Z
p8
G
p3
Q
E


E S P E R A N T O

# Uzo de la Esperanto-flago dum funebraj ceremonioj


José M. Rodríguez (Hispanio)

Ĉiu ŝtato, ĉiu flago havas sian propran protokolon por omaĝi elstarajn forpasintojn. Kompreneble Esperantio estas nek nacio, nek ŝtato, tamen ni havas propran flagon kaj pro tio, oni devas difini kiamaniere uzi ĝin korekte okaze de funebraj ceremonioj.

1. Kiam oni uzas la Esperanto-flagon por kovri ĉerkon, la blanka kvadrato devas okupi la lokon sur la ĉerko kie troviĝas la kapo. Supra pinto de la stelo devas esti sur la maldekstra ŝultro de la kadavro, tio estas, proksime de ties koro.




2. Kiam sur la ĉerko aperas religia simbolo, ekz. kruco, stelo de Davido, kreskanta luno, ktp, la esperanto-flago ne devas kovri tiun simbolon. Oni devas meti tiam la flagon sur la ĉerko ĉi-maniere:




- La Esperanto-flago devas kovri nenian religian simbolon.
- Nenia religia simbolo devas esti lokigita sur la Esperanto-flago.
- La Esperanto-flago ne devas tuŝi la plankon.

3. La flago neniam devas esti ligita al ĉerko per zonoj, ŝnuroj aŭ pere de kia ajn alia ligilo, la flago devas kovri la ĉerkon libere kaj ĝi neniam tuŝos teron aŭ plankon.


4. Se la ĉerko estas enterigita, antaŭ ol ĵeti teron sur la ĉerkon oni devos demeti la flagon, ĉar, kel dirite, ĝi ne devas tuŝi la teron. Male, se la ĉerko estas lokigita ĉe niĉo aŭ ĉe enmura tombo, la flago povas kovri tie la ĉerkon.


5. Oni devos eviti meti nigran (aŭ ali-koloran) funebran krepon sur la flago kovranta la ĉerkon. Tamen, oni povas fiksi tiun krepon sur apudaj starigitaj flagoj.









Ne, duon-hisigita kun krepo
aŭ ene de fermita loko


# La Angulo de la blazonoj: *Ekvadoro*

Ekvadoro, kune kun Venezuelo, Kolombio kaj Panamo, estis teritorio de la iama Granda Kolombio, ŝtato kiu nur sukcesis travivi de la jaro 1822 ĝis 1830, post la sendependenca milito de la hispanaj kolonioj en Ameriko kontraŭ la metropolo. La flago de tiu Granda Kolombio estis preskaŭ tute simila al tiuj de Venezuelo, Kolombio kaj Ekvadoro (tri horizontalaj strioj flava, blua kaj ruĝa), do, por distingi ĉiuj flagon, estis necese aperigi sur ili aliajn elementojn, kiel steloj sur la venezuela flago aŭ la nacia blazono sur tiu de Ekvadoro.



Sur la blazono de Ekvadoro estas eble vidi jenajn elementojn kun ĉi tiuj signifoj:

- Kondoro: ĉi tiu granda birdo prezidas kaj protektas la tutan blazonon. La kondoro vivas en montaro Andoj kaj apude, tio estas ekde Kolombio ĝis Patagonio en Argentino, kompreneble ankaŭ en Ekvadoro. Ĉe la blazono ĝi reprezentas potencon kaj kuraĝon. Kiel dirite, temas pri la plej granda birdo fluganta en Ameriko, kies enverguro povas ampleksi ĝis 3,2 metroj. Ĝi estas reprezentata ekfluganta kun flugiloj malfermitaj.




- Meze de la blazono aperas pejzaĝo. Supren brilas la suno, simbolo de la inkaa kulturo de la pra-kolomba Ekvadoro. La suno aperas ene de bendo kaj meze de la zodiakaj signoj Ŝafo, Taŭro, Ĝemeloj kaj Kankro. Ili reprezentas la monatojn de marto ĝis junio, daŭro de la ekvadora liberala revolucio de la jaro 1845. Ĉe la pejzaĝo aperas ankaŭ la vulkano Ĉimborazo, el kiuj eternaj neĝoj naskiĝas la rivero Gŭajazo. Sur la rivero navigas vaporŝipo ornamita kun la koloroj de la ekvadora flago kaj ĝi transportas la simbolon de la dio Merkuro, reprezentanta la komercon.



- Flanke videblas kvar naciaj flagoj de la respubliko. Dekstren, inter la du flagoj, aperas branĉo de palmo, simbolo de la martiroj kiuj luktis favore al la sendependiĝo. Maldekstren branĉo de laŭro reprezentanta la venkon.





- Sube de la blazono aperas bastonfasko. En la antikva Romio temis pri simbolo de la liktoroj, kiuj reprezentas la respublikan staton de Ekvadoro.





# Mallongaj Informoj pri la Asocio V.E.N.T.O.

Estimataj veksilologiaj amikoj, jam estas tempo oficialigi la asocion. Do, ni informas al vi pri la agad-plano plenumota dum la venontaj monatoj por atingi tion kaj kompreneble, ĉiuj estas invitataj ĉefroli kaj kunlabori en ĉi tiu bela projekto. Jen plenumotaj paŝoj:

1) Post kelkaj semajnoj jam estos preta la projekto pri statuto de la asocio VENTO, ellaborota de nia hispana samideano Alejandro Burgos Escalante. La statuto estos redaktata laŭ la hispana leĝaro, pro la fakto, ke la plejmulto el la iniciantoj de ĉi tiu ideo fondi veksilologian asocion loĝas en Hispanio. Malgraŭ la hispaneco de la plenumota leĝaro pri asocioj, VENTO estos internacia asocio.

2) Post la diskonigo de la projekto, ĉefe pere de la telegram-grupo "Flagoj" kaj la sendo de informoj al ĉiuj interesitoj, ĉiuj rajtos proponi modifojn al tiu projekto de statuto. Post komuna akordo oni registros la asocion en Hispanio.

3) Post la oficiala registro oni organizos komunan renkonton de ĉiuj interesitoj aparteni al la asocio pere de skajpo aŭ alia simila komunikilo.

4) La celo de la asocio estos priesplori veksilologiajn aferojn kaj publikigi ilin en la internacia lingvo Esperanto, kaj pere de nia revuo VENTO kaj per specifaj publikigaĵoj (presitaj libroj en sur interreto) pri veksilologio.


5) La asocio petos sian aliĝon al FIAV (*Fédération Internationale des Associations Vexillologiques* -Internacia

6) Federacio de Veksilologiaj Asocioj) kiel plenrajta asocio. Nuntempe apartenas al tiu internacia federacio 49 asocioj.

7) Aligi VENTO-n al UEA kiel fakan asocion pri veksilologio.

Se vi deziras ĉefroli kaj kunlabori en ĉi tiu projekto kontaktu kun ni: cordoba@esperanto.ac Kaj, malgraŭ la fakto, ke ni parolas pri asocio, ni petas al vi nenian kotizon.

# Veksilologia terminaro




Laŭ Jaroslav KLEMENT "*Heraldiko, Veksilologio: Terminaro en Esperanto*" *1979*

# Kiel kunlabori kun VENTO:

✓ Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo Esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

✓ Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

✓ Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

✓ La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni rievas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

✓ Memoru, ke niaj elektronika adreso estas: cordoba@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:
*Revuo VENTO*
*Apartado de Correos 3142*
*E-14080 Córdoba (Hispanio)*

**VENTO** aperas tri-foje en la jaro (aprilo – aŭgusto – decembro).

# *Veksilologia humuro*

***Proporcioj de flagoj***



1:1



1:2



2:3




8:11



13:15



11:28



$$1:\frac{6136891429688-306253616715\sqrt{2}-\sqrt{118-48\sqrt{2}}\,(934861968+20332617192\sqrt{2})}{4506606337686}$$

Notu la adreson de nia revuo: cordoba@esperanto.ac

La adreso estis afable havigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La poŝta adreso daŭras esti valida, jen ĝi:

Revuo VENTO. Apartado de Correos 3142. E-14080 Córdoba (Hispanio).

Artikoloj, kritikoj kaj kiu ajn kunlaboro estos ĉiam bonvenaj.


VENTO
Via veksilologia informilo en
ESPERANTO